

Heinrich Lersch,

## Laboro

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Muĝe falas marteloj,  
takte kun peza bat'.  
Krias metalaj langoj.  
Ek, al la laborad'!

Knaras kaj kriĉas rimenoj,  
pezas al ni la labor',  
sonas tien kaj reen  
de la komandoj sonor'.

Estas kantado forta  
tio, potenca, sen fin',  
estas muziko por ĉiu,  
kiu kutimis ĝin.

*Traduko de la Germana poemo "Arbeit" de HEINRICH LERSCH (\*1889-09-12 – †1936-06-18) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1984.*

*MR-047-1 / Arg-728-1470 (2014-04-11 22:33:05)*

*Pri la poeto vidu la retejojn [http://de.wikipedia.org/wiki/Heinrich\\_Lersch](http://de.wikipedia.org/wiki/Heinrich_Lersch) kaj <http://gutenberg.spiegel.de/autor/780> kaj [http://de.metapedia.org/wiki/Heilige\\_Flamme!\\_GLFöh!](http://de.metapedia.org/wiki/Heilige_Flamme!_GLFöh!).*